FN PER ANC 47

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

Redaktas: A. BEaumont
35 rue Frédéric Sauvage
LE HAVRE (S.Mme)

Novembro 1964 Nº 74

NI FUNEBRAS.- La Ian de Oktobro, la redaktisto havis la doloron perdi sian fratinon, Finon Elisabeth JOUIS; ŝi estis delegitino de U.E.A. en Bihorel-les-Rouen, fakdelegitino pri skoltismo, kaj plie materie okupiĝis pri la Normanda Bulteno, ĝin tajpante kaj ekspedante.

Kvankam ofte malsana, ŝi entuziasme laboris por Esperanto, kaj havis multnombrajn gekorespontantojn el ĉiujn partoj en la mondo.

Pro tiu perdo, nia bulteno pli malfacile aperos, sed ni tamen faros nian eblon por bone daŭrigi tiun nepre bezonatan ligilon.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## LA VIVO DE LA GRUPOJ

Sinjoro BOSC, nia konata propagandisto, ĉiam rondiras tra la Normandaj Grupoj, kaj efike apogas la bonvolulojn. Li sendis antaŭ nelonge cirkuleron por demandi ke oni informu la bulteniston pri la antaŭviditaj kursoj. Jen kelkaj respondoj, kune kun aliaj sciigoj:

LES ANDELYS.- Kursoj ĉe la knabinlernejo kiel kutime. Sinjorino VINCENT ĉeestis la universalan kongreson en Hago, kaj presentos lumbildojn okaze de la Zamenhofa Tago, dimanĉon I3 an de decembro.

BAYEUX.- Fraulino CHERIE, iom malsana, nur okupiĝos pri lernantino kiu estas instruistino.

C A E N .- Estos Sinjorino ROLAND, I9 rue Eugènie en CAEN kiu eventuale zorgos pri la grupo se ŝi povos.

LISIEUX.- Ni unue menciu, ke 3 fotoj estas disponeblaj pri la lasta Kongreso Normanda. 1/ ĉe la ekstera stuparo de la domo pri kulturo por Junuloj. 2/ En la salono je la urbdomo, dum la akcepto de la vicurbestro, Sinjoro CLERC. 3/ En la sama salono, dum la alparolado de Sinjoro CLERC : oni el proksime vidas Sinjoroj CLERC, HUET, BOSC, kaj kvar aliajn gesamideanojn.

Ni bedaŭras ke ni ne jam indikis la eksiston de tiuj fotoj en la antaŭ nº de la bulteno.

Unu foto kostas 3 frankojn, inklusive de la sendkosto. Oni mendu al :
Sinjoro CHENU, I6 rue F.Daulne - LISIEUX - (Calvados)
Poŝta ĝirkonto : Rouen 937 - 29 - E

En Lisieux okasos du kursoj.

DOMFRONT.- Kursoj jam de Oktobro - parolekzercoj, korespondado per sonbendoj - precipe Novzelando.
Sinjoro VERON alvokas al la Normandaj Esperantistoj kiuj eventuale povus rekonti alilandulojn.

R O U E N .- Renkontoj kaj paroladoj ĉiu unua lundo, knabina lernejo, rue Marie Dubocage. La venonta kunveno okazos la 7 an de Decembro je 8,30.

V I R E .- Sinjoro SAPERAS, 2 rue des Capucins, anoncas nedevigan E. kurzon ĉe la liceo kie li estas profesoro; se la gepatroj estos favoraj la

kurzo povos daŭri dum pluraj jaroj.

Sinjoro LEGRET, 30 rue Ch. Drouet, intencas gvidi du kursojn por kelkaj knabinoj.

LE HAVRE.- La 7 an de Novembro, la Honor-Prezidento de l'Unuiĝo Normanda, S-ro BOSC, oficiale malfermis la kursojn. Tiu okaze, li paroladis antaŭ proksimume 50 personoj. La reprezantatoj de la lokaj gazetoj ĉeestis; ili faris raportojn en siaj gazetoj. Kiel Kutime, tri kursoj funkcias : unua grada kurso, gvidata Prezidanto, S-ro HAMMAUX; dua kaj tria grada kursoj, gvidataj de S-no LAVALLEE - Unu foje monate, okazas familia rondo.

------------

VIZITO DE ALILANDAJ ESPERANTISTOJ

En ROUEN ni akceptis Sinjoron Profesoro Sin'itoro Kawamura, Profesoro de Agrikultura Biokemio en Japanujo. Ni vizitigis al li la Agronomian Stacion, la urbon Rouen, kaj kelkaj belaj pejzaĵojn en alta Normandujo.

---

Cu la grupaj kunvenoj estas kadukaj ? (vidu la antaŭ nº)

Komprenebble kiam nur 5 au 6 anoj ĉeestas, la kunveno ne povas esti tre vigla. Despli ke el 6 kunvenantoj, nur 1 au 2 konsentas paroli en Esperanto. Esperantaj kunvenoj estas kiel la hispanaj gastejoj : oni manĝas kion oni alportas Tiuj kiuj plendas kaj mem nenion diras aŭ faras dum la kunveno plendas senrajte.

Sed vi demandas vin kion fari ? Nu, ni devas nin adapti al la moderna vivo Unu deklarita grupo estas utila pro diversaj kialoj, do ni konservu ĝin, se eble sub moderna nomo kiel : " Centre Culturel Zamenhof".

Due, ni ne havu komplekson se la grupo ne havas fiksan kunvenejon kaj ne kunvenas regule, sed tiam, ni organizu bonan reton inter la aliĝintoj : adreslistoj kun favoraj tagoj kaj horoj, telefon-numeroj, k.t.p.

Se eble, ni havu ĉe diversaj komercistoj favoraj, en kelkaj punktoj de la urbo, leterkestojn, por facila transdono de leteroj, de libroj aŭ aliaj dokumentoj de unu al la aliaj.

Oni havu nur specialigitajn kunvenoj, ekz, por projekciojde diapositivoj el iu ano, poste la ferioj. Kaj la Sekretario akurate sendu, ĉiufoje, kunvokilojn. Tio estas iom kosta, sed necesa. Se oni povas uzi modernan maŝinon, kiu permesas multigi teskton sur poŝtkartojn, oni faru specialan propagandan karton, sur kiun oni deponos la kunvokajn tekstojn.

Oni instigu kvartalajn grupetojn. Nur kelkaj anoj tiam partoprenus en laboraj kunvenetoj, ĉe aŭ alia membro domo, kaj se eble, kun iu el la estrarano.

De tempo al tempo, la estraro kunvenu post interlefona interkonsento. Oni faru cirkuleron alla membroj por informi pri la proponoj kaj decidoj. La membroj eventuale respondu rekte aŭ pere de la leterkestpunktoj.

Oni organizu, dufoje aŭ trifoje en la jaro, dimanĉojn eksterajn kunvenojn, ĉe iu loko situanta de 20 ĝis 40 kilometroj, for de la urbo. Tiuj kiuj havas aŭtomobilon helpu al tiuj kiuj ne havas. Oni kunportu magnetofono kun esperantaj kantoj, k.t.p.

Oni... sed eble ankaŭ vi havas ideojn por modernigi la grupojn; ideojn realigeblajn kaj kiujn vi mem bonvolus vivigi ? Nu, skribu al via bultenisto, prefere en esperanto. Se vi ne havas vortaron, vi povas aĉeti unu ĉe esperanta librejo. Do, ĝis la plezuro legi el vi.

Votre Trésorier vous parle :

L'année 1965 est en vue.
Pour l'Esperanto, la Normandie continue;
Chacun dahs sa ville se remue.
Par tous, le bulletin sera lu;
Il a, jusqu'ici, été bien soutenu.

C'est pourquoi notre cotisation U.E.N./Bulletin reste fixée, jusqu'à nouvel ordre, à 2 francs par personne. Envoyez au moins cela et plus si vous pouvez. De préférebce au compte chèque postal :

UNION ESPERANTISTE DE NORMANDIE
CCP ROUEN : 283 40 E

Bien indiquer: nom, adresse et destination de la somme envoyée.

Voici en outre la liste des cotisations UEA/UFE à faire parvenir de préférence à :

UFE 34 rue de Chabrol, PARIS Xº - CCP Paris 855-35

| | |
|---|---|
| Etudiant et jeune | : 2 Frs |
| adhérent | : 4 " |
| junior | : 7 " |

Les membres de cette catégorie font partie de l'association internationale, neutre, UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO et reçoivent des circulaires de temps à autre. En outre, ils peuvent faire appel aux 33.600 délégués de l'U.E.A. répartis dans le monde entier (ajouter 0,30 pour frais d'envoi de la feuille de coupons de justification auprès des dékégués)

| | |
|---|---|
| Titulaire | : I8 Frs |
| Donateur | : 22 Frs |

Ces membres reçoivent en outre la revue française : FRANCA ESPERANTISTO
Abonnement simple à la revue : 20 Frs.

Pour recevoir l'ahnuaire international de l'UEA, ajouter I4 Frs;
Pour recevoir l'annuaire et la revue internationale ESPERANTO : 28 F.
Abonnement simple à la revue "ESPERANTO" : 2I F.

Attention, les cotisations U.E.A. sont susceptibles de changer d'ici quelques mois.

-0-0-0-0-0-0-0-0-